

Eŭropa Bulteno

Januaro 2008, № 1 (66)

De la redakcio...



EKSPOZICIO PRI ESPERANTO EN EŬROPA PARLAMENTO

La 30-an kaj la 31-an de januaro 2008 okazis en la ejoj de la brusela Eŭropa Parlamento (sur la dua etaĝo) ekspozicio organizita de la slovena parlamentanino Ljudmila Novak pri la slovenaj minoritatoj ekster Slovenio kaj minoritatoj en Slovenio. Ŝi disponigis parton de la ekspozicio ankaŭ al Esperanto kaj la estraro de EEU taskigis la prezidanton kaj Maja Tišljar prizorgi la disponeblan spacon (4 panelojn kaj unu tablon). Desajnistino Danka Tišljar (fratino de Maja) desajnis 8 afiŝojn por la 4 paneloj kaj la prezidanto prizorgis libran kaj alian materialon por ekspozicii sur la tablo.

La solena malfermo okazis la 30-an de januaro je la 13-a horo kaj krom Ljudmila Novak parolis ankaŭ Sean O Riain (lian originalan paroladon ni

prezentas ankaŭ ĉi-bultene). Flory Witdoeckt kantis eŭropan himnon en Esperanto (teksto de Brocatelli). Ĉeestis pluraj politikaj gravuloj, interalie ankaŭ kelkaj ministroj de Slovenio. Dum la tuta ekspozicia tempo deĵoris Maja por distribui informojn kaj faldfoliojn. Okazis pluraj interesaj interparoloj post la ekspozicio, sed pri tio ni aperigos apartan artikolon en la sekva numero de la Bulteno.

Zlatko Tišljar

Eŭropa Bulteno

Januaro 2008, № 1 (66)

EXHIBITION "YOUTH IN INTERCULTURAL DIALOGUE: WHAT CAN ESPERANTO CONTRIBUTE?", EUROPEAN PARLIAMENT, 30-31 JANUARY 2008

Karaj gesinjoroj Deputitoj Eŭropaj, karaj amikoj;

1. Je vous parlerais volontiers en français, la langue que je parle avec mon épouse; und auf Deutsch möchte ich Frau Abgeordnete Ljudmila Novak für die hervorragende Zusammenarbeit in der Vorbereitung dieser Ausstellung recht herzlich bedanken. However, I am told that most of you understand English better.
2. The purpose of this exhibition is to raise awareness of the potential of Esperanto in promoting intercultural dialogue. I am always amazed to hear people say that "Esperanto is an artificial language which gives access to no culture". On the contrary, Esperanto is more like a test-tube baby - only its conception was artificial, and that took place 121 years ago. There is more high-quality literature, both original and translated, in Esperanto than one could read in a lifetime. How can a language which has native speakers still be called artificial? One such native speaker of Esperanto, Ulrich Brandenburg, is the new German Ambassador to NATO. Esperanto combines a Latin/French vocabulary with a structure similar to Hungarian and Finnish.
3. Why do I believe that Esperanto can contribute to intercultural dialogue? Because I have seen it work in practice. I have seen children from 15 countries playing happily together in Esperanto. I have seen 500 young people from all our countries at a lively concert, where everybody sang along in Esperanto. This beautiful, finely-nuanced language, mocked by the unknowing and persecuted by mass murderers like Hitler and Stalin, has withstood the test of time.
4. In the European Parliament in April 2004, in a plenary vote on the Dell-Alba Report, 43% of MEPs voted that a possible role for Esperanto in maintaining multilingualism should be considered. This is for me the most exciting feature of this language – it improves and accelerates the learning of other languages, thus directly promoting multilingualism!! Because it is so regular and streamlined, a month's study of Esperanto is the equivalent of a year studying a national language. It therefore encourages weaker students, and leaves more space in the curriculum for other languages. The "Springboard" project in Britain, begun in 2006, is testing this idea in practice (www.springboard2languages.org) in 4 schools.
5. The Swiss economist, Prof. François Grin, has written that the EU could save €25 billion every year by finding a role for Esperanto (<http://lingvo.org/grin/>). I end with a practical proposal: could the Cultural Committee of the European Parliament commission a report by experts on what Esperanto has achieved to date? Such a report would be very appropriate in 2008, the European Year of Intercultural Dialogue.

Multan dankon pro via atento. (in Irish: Go raibh maith agaibh as ucht éisteacht)

Seán Ó Riain

President

EEU/European Esperanto Union

SLOVENIO GVIDAS EŬROPAN UNION



La 1-an de januaro 2008 Slovenio, lando kun 0,4% de la loĝantaro de Eŭropa Unio transprenis la administran kunordigadon de Eŭropa Unio dum la sekvaj ses monatoj. Temas praktike pri gvidado de grandega Eŭropa Unio, kiun transpresis la unuan fojon iu el la novaliĝintaj landoj de 2004, la unuan fojon gvidas EU-on iu slava lando kaj iu lando de eksa socialisma sistemo.

Dum la ses monatoj okazos en Slovenio pli ol 200 gravaj konferencoj kaj kunvenoj de ministroj kaj temkonferencoj kaj plurcento da kunvenoj de diversaj komisionoj kaj fakgrupoj. Ankaŭ pluraj aranĝoj okazos ekster Slovenio kunordigataj de slovenoj.

La komencon signis solenaĵo dum la 7-a kaj 8-a de januaro. Unue solene kunsidis la registaro de Slovenio kun la Eŭropa Komisiono en Ljubljana, sekvis konferenco pri Interkultura Dialogo kaj la tuton fingarnis granda solenaĵo en la centra kulturdomo Cankarjev dom kun partopreno de 1500 personoj reprezentintaj la kompletan slovenan eliton. En la konferenco partoprenis ankaŭ du reprezentantoj de Eŭropa Esperanto-Unio (Zlatko kaj Maja Tišljar). Dum la konferenco interalie ni aŭdis la jenajn frazojn de la gvidantoj de unuopaj sekcioj: Zvonko Kovač diris: »Mi esperas, ke en EU ni ne devos komuniki nur en la angla lingvo.« Edvard Kovač diris: » La nuna bilingvismo (uzo de la gepatra kaj la angla) estas granda danĝero« kaj » Necesas atenti, ke la anglan oni ne proklamu kiel ununura lingvo de la scienco.« La slovena ministro pri kulturo Vasko Simoniti diris interesan frazon pri rilato inter kulturo kaj ekonomio: »Kulturo ne estas kontraŭulo de la ekonomio, sed ĝi ankaŭ ne estas malriĉa parenco, kiun oni devas ĉiam finance helpi.«

Postagmeze en la malnova kastelo de Ljubljana estis solene suskribita deklaro pri kunlaboro de eŭropaj kulturfestivaloj. La subskribon surmetis krom reprezentantoj de dudeko da festivaloj



ankaŭ eŭropa komisionano pri instruado kaj kulturo Jan Figel (surfote Jan Figel parolas dum tiu chi aranĝo) kaj la urbestro de Ljubljana Zoran Jankovič.

Fine en la grandioza ferma solenaĵo parolis la slovena ŝtatprezidanto, Danilo Turk, Eŭropa komisionano Jan Figel, slovena filozofo Edvard Kovač, prezidanto de Eŭropa Palamento Gans-Gert Poettering kaj la prezidanto de slovena registaro Janez Janša.

Eŭropa Esperanto Unio transprenis la taskon eldonadi Informilon pri Eŭropaj okazaĵoj dum la slovena administrado, kiu aperos monate en Esperanto kaj pere de Esperanto en kelkaj aliaj

lingvoj krom en la tri pri kiuj zorgas la slovena ŝtato (slovena, angla, franca). La oficialan paĝaron en tiuj tri lingvoj vi povas trovi ĉe www.eu2008.si kaj la informilon en Esperanto ĉe

<http://europa.eu/index.php?art=3&art2=30>.



Intertempe jam okazis malgranda lingva konflikto. Laŭ la germana presagentejo DPA Germanio protestis ĉe la slovena registaro pro la plano ne uzi la germanan kiel unu el la laborlingvoj en la neformalaj kunsidoj de la ministroj. Nome, la slovena sistemo antaŭvidas ĝenerale la uzon nur de tri laborlingvoj: la slovena, la angla kaj la franca. Tiel faris ankaŭ aliaj landoj antaŭe sed escepte de tio uzis en unuopaj partoj de la sistemo ankaŭ kelkajn aliajn lingvojn. Ekde 2001 estas kutimo ke en la neformalaj ministraj kunvenoj oni uzas ankaŭ la germanan. Slovenio post la protesto akceptis la proponon kaj la ministraj konferencoj havos ankaŭ la germanan kiel laborlingvo.



Zlatko Tišljar

LA DEFIO DE LA POLITIKO DE PLURLINGVECO KAJ LINGVOLERNADO

Ekzistas certa kompreno de la lingvouzado kiel ia "natura fenomemo", kiun ni ne povas konscie influi, iom kiel la vetero. Se tio estus vera, Izraelo ne parolus la hebrean hodiaŭ, kaj Turkio ne uzus la latinan alfabeton. Kiam januare 2007 la EU nomumis sian unuan Komisionanon por Plurlingveco, la rumanon Leonard Orban, kelkaj anoj de la Eŭropa Parlamento ne komprenis kial necesis tia nova posteno. Ili ŝajne ne konsciis kelkajn gravajn lastatempajn evoluojn en ĉi-tiu kampo, kiuj montras la bezonan de pli sistema kaj objektiva aliro al la lingvopolitiko de EU.¹

Kiel irlanda diplomato kiu ĵus eklaboris pruntedone en la Eŭropa Komisiono, kaj kies doktoriĝa tezo pritraktas la lingvoplanadon en Irlando kaj en Kebekio, mi aparte interesiĝas pri lingvopolitikaj evoluoj. Portempe mi nun laboras en la plej granda tradukejo en la mondo, kie 2 500 tradukistoj komprenebligas la agadon de EU tra 23 oficialaj laborlingvoj al 492 milionoj da homoj en la 27 membroŝtatoj. Kial ni interesiĝu pri lingvopolitiko? Pro tio, ke la kreskanta dominado de la angla en Eŭropo pli kaj pli endanĝerigas la samrajtecon de civitanoj, kaj do de la demokratio mem, kaj de ĉiuj aliaj lingvoj. Eble, vi malfacile povas imagi tion. Tamen, ni pripensu la sekvan eron de la historio de Irlando: en 1800 Irlando ankoraŭ plejmulte parolis irlande en la ĉiutaga vivo. Tiutempe verkistoj ne povis imagi ke Irlando povus iĝi angleparolanta. Tamen, ĝis 1851 ĝuste tia ĝi fariĝis. La ĉefa defio kiun alfrontas la lingvopolitiko de EU estas defendi la lingvan diversecon. Plejmulte ni emas ŝati ruĝajn rozojn, sed ĉu ni volas ĝardenon de ruĝaj rozoj kiu havos neniun alian floron?

KELKAJ LASTATEMPAJ EVOLUOJ EN LA LINGVOPOLITIKO EN EU

En 2003 publikiĝis la sema verko de profesoro Robert Phillipson, *Ĉu nur-angla Eŭropo? Defio al Lingvopolitiko*², kiu zorge klarigis, sen lasi dubon, la nunan lingvan direkton de Eŭropo. En 2005 la Raporto Grin montris ke la nuna internacia dominado de la angla lingvo alportas € 17 miliardojn jare al la brita ekonomio, kaj 4% de tiu sumo al Irlando. Sekvadis malpliigo de motivado en la anglalingvaj landoj por studi aliajn lingvojn. Ekzemple, en 2002 oni rajtigis britajn infanojn ĉesi la studadon de fremdlingvoj je la aĝo de 14 - decido kiu provokis publikan komunan proteston de la ambasadoroj de Francio, Germanio, Hispanio kaj Italio. En 2006 la germana Eŭropa Parlamentano Michael Gahler postulis malpliigon de la kvanto de britaj kaj irlandaj civitanoj kiujn dungas la EU-instancoj, por kompensi la avantaĝon kiun donas la kreskanta uzo de ilia denaska lingvo kiel *lingua franca* de EU. En marto 2007 la slovaka vice-ĉefministro Dušan Čaplovič skribis al ĉiuj ministroj pri eksteraj aferoj de la EU-landoj por altiri atenton al la Raporto Grin kaj proponi diskutadon de la EU-lingvopolitiko je inter-registara nivelo. En majo 2007 la itala ministrino pri eŭropaj aferoj, Emma Bonino, publike subtenis la slovakon iniciaton dum konferenco en Bruselo. Fine, la 9-an de majo 2007, nobelpremiito profesoro Reinhard Selten, dum ceremonio en la Eŭropa Parlamento en Bruselo, proponis

¹ Kiel tiu de *Gesellschaft für Interlinguistik e.V./GIL*, vidu <http://www.interlinguistik-gil.de/>.

² Routledge 2003, majstre esperantigis ĝin István Ertl, UEA 2004. Vidu ankaŭ Claude Piron 1994, *Le Défi des Langues*, Parizo, L'Harmattan, por klara analizo de la problemoj kiujn kaŭzas la internacia anglalingva dominado.

³ Tuta raporto, france, ce http://cisad.adc.education.fr/hcee/documents/rapport_Grin.pdf. Estas unupaga resumo en 24 lingvoj, aprobata de profesoro Grin, ce <http://lingvo.org/grin/>.

"ke iuj EU-ŝtatoj devus akordiĝi antaŭenigi la instruadon de Esperanto kiel la unua fremdlingvo en siaj lernejoj, por plibonigi la lingvolernadon ĝenerale, ĉar la lernfaciliga efiko estas tiel forta ke pli rapide oni lernas fremdlingvon tiel ol lerni nur la fremdlingvon".⁴

LA IRLANDA LINGVO - SUBIRO KAJ REVENO

La irlanda estas kelta lingvo kiu havas skriban literaturon ekde la jaro 597 A.D., kaj tiel estas unu el la plej malnovaj literaturaj lingvoj de Eŭropo. Oni foje erarige nomas ĝin *la gaela*, la genra termino. La mallongigo GA venas de la irlanda vorto por la lingvo, *Gaeilge*, sed nomi ĝin *gaela*, *Gaelic*, *gaélique* ktp tiom malprecizas kiom nomi la anglan *ĝermana*. La lingvo ne havas verbon *havi*, sed por esprimi la ideon *esti*, ĝi havas kaj la hispanan distingon *ser/estar (is/tá)*, kaj la polan kaj alian slavan kontraston *jest/bywa (tá/bíonn)*.

Dum du mil jaroj la irlanda estis la lingvo de la tuta Irlando, kaj dum pluraj jarcentoj de preskaŭ la tuta Skotlando⁵, kiel klare montras la lokonomoj. Ĝin paroladis 5 milionoj dum la 1840-oj, kiam la irlanda loĝantaro de 9 milionoj estis ĉirkaŭ duono de la tiama loĝantaro de Britio. La unuaj leĝoj de la britaj koloniistoj kontraŭ la irlanda lingvo estas de 1366, la fifamaj *Statutoj de Kilkenny*. Magraŭ tio ĝi restis la lingvo de la plejmulto de irlandanoj ĝis la mezo de la 19a Jarcento. Serio de faktoroj tiam kondukis al katastrofa subiro. Por mencii nun unu: la Malsatego de 1845-49, dum kiu 1-2 milionoj mortis pro malsato. En 1891 nur 3% de la infanoj parolis irlande denaske, kaj estis timo de la lingvo tute malaperos. Tamen en 1893 fondiĝis nova popola movado, *Conradh na Gaeilge* (la irlandlingva ligo), kiu kaj savis la lingvon kaj kondukis la landon al la politika sendependeco en 1922. La unua decido de la unua sendependa irlanda registaro en februaro 1922 igis la studadon de la irlanda deviga dum almenaŭ unu horo tage por ĉiuj infanoj en la unua- kaj duagrada lernejo.

Danke al la forta subteno de kaj la registaro kaj la popolo, la irlanda pliforgiĝis lastatempe: Konstanta kresko de la kvanto de irlandlingvaj lernejoj ekde 1972; irlandlingva televida stacio, *TG4*, ekde 1996; la brita registaro konsentis fari konkretajn elpaŝojn por antaŭenigi la irlandan en Nordirlando en la *Interkonsento de Sankta Vendredo* inter Irlando kaj Britio en 1998; la unua ĉiutaga gazeto en la irlanda, *Lá Nua* (nova tago), en 2002; la Leĝo pri la Oficialaj Lingvoj de 2003 – la unua leĝo kies celo estas la laŭstupa kreskado de la uzo de la irlanda. Ekstreman psikologian gravecon havis la unuvoĉa decido de la EU-Konsilio de Ministroj la 13-an de junio 2005 igi la irlandan unu el la oficialaj laborlingvoj de EU. Tiu decido sekvis kampanjon kiu altiris milojn de manifestantoj sur la stratojn de Dublino kaj arigis pli ol 80 000 subskribojn.

Malgraŭ tiuj gravaj progresoj, estas profunda krizo en la instruado de la irlanda. La raporto Harris de 1984 kaj 2006⁶, pri la instruado de la irlanda en unuagradaj lernejoj, montris ke 96% de la studentoj de la irlandlingvaj lernejoj, *Gaelscoileanna*, majstris ambaŭ lingvojn; sed ke en la anglalingvaj lernejoj 70% de studentoj malmulte progresas en la lernado de la irlanda. Tio kondukis al iom da kritikado pri la eliteco de la lingvolernado: nur elito ellernas la irlandan, kaj la edukistemo havas la neintencan efikon de malhelpi la plejmulton havi pozitivan sperton de lingvolernado kaj plurlingveco.

ĈU LA LERNFACILIGA EFIKO POVUS PLIBONIGI LA INSTRUADON DE LA IRLANDA?

⁴Plena teksto ce <http://www.liberafolio.org/2007/seltenparolado>

⁵ La latina vorto *scotus* signifis simple *irlandeparolanto* - ne gravis de kiu lando.

⁶ D-ro John Harris 2006, *Irish in Primary Schools*. Dublino: Ministrejo pri Edukado kaj Scienco.

Kio estas la propedeŭtika, aŭ pli klare lernfaciliga, efiko? Ĝenerale akceptatas ke la ellerno de iu ajn lingvo emas plibonigi la postan lingvolernadon – okazas transfero de la lingvolernaj lertoj. Ekzemple, la *Modelo Biberacher*, t.e. mallongaj preparigaj kursoj en la latina por plibonigi la sekvan lingvolernadon, uzatas en 60 duagrada lernejoj en Baden-Württemberg.⁷ La specifa problemo en Irlando estas ke la dua lingvo kiun oni plej ofte studas, la irlanda, estas malfacila laŭ la plejmulto de studentoj, kaj ke ilia manko de sukceso en la irlanda konvinkas ilin eĉ ne provi lerni aliajn lingvojn. Kial angleparolantoj trovas la irlandan malfacila? Pro ĝia strukturo, kiu ege malsimilas la anglan; pro la esceptoj al ĝiaj gramatikaj reguloj, kaj pro la esceptoj al la esceptoj. La ideo pri regula, facile lernebla lingvo, kiel travadoŝtono al la lernado de la pli malfacilaj naciaj lingvoj ne novas, sed kiel la metra sistemo⁸, bezonas tempon por atingi ĝeneralan akcepton. Malpli gravas kiu lingvo uzatas ol la fakto ke ĝia strukturo devas kontribui al rapida kaj facila lernebleco. Ni agnosku, tamen, ke Esperanto ŝajnas havi pli evouintajn lernfaciligajn ecojn, pro ties strukturo kaj internacieco, sed mi bezonas doni multajn detalojn pri tio al la homoj kiuj jam konas ĝin. La itala ministrejo pri edukado jam listigis longan serion de eksperimentoj kiuj montris la potencialon de Esperanto⁹, kaj ekzistas ampleksa literaturo.¹⁰

Similas la principo al lerni piediri antaŭ kuri, lerni skiadon unue sur malpli krutaj deklivoj antaŭ ol alfronti la Alpojn, aŭ eklerni biologion per la travidebla skeleto antaŭ ol studadi la pli komplikan homan korpon. La memfido kiun donas la majstrado de atingeblaj celoj emas helpi studentojn ellerni pli malfacilajn lingvojn. Gustumigi lern sukceson al la pli malfortaj studentoj igus la lingvolernadon pli demokrata kaj populara. Kelkaj eksperimentoj, kiel tiuj de la Kibernetika Fakultato de la Universitato de Paderborn, Germanio, per la uzo de Esperanto eĉ montris ke la tempo kiun prenas la lernfaciliga kurso estas malpli ol la gajno pro la pli rapida sekva lingvolernado. La nuna laboro en Britio en tiu kampa estas aparte interesa¹¹: 110 studentoj ekstudis Esperanton lerneje cele al plialtigo de lingva konscio kaj plibona sekva lingvo lernado septembre 2006, kaj temas jam pri 230 studentoj en kvar lernejoj. La rezultoj estos interesaj.

Ĉu tiu laboro povus plibonigi la instruadon de la irlanda? Ankoraŭ ne estas klara respondo, sed certe indas esplori. D-ro Eugene McKendry, Direktoro de la Centro pri Lingvoinstruado de la Universitato de Belfast, Nordirlando, proponis ke oni testu tiun tezon en la praktiko, dum prelego en Trinity College, Dublin en 2006.¹² Aldone li pritraktis la malfacilan demandon pri kiujn lingvojn oni devus studi en la irlandaj lernejoj, kie la franca tradicie superregadis, pro tio, ke la plej parolata fremdlingvo en Irlando nun estas ... la pola!

La Eŭropan Tagon de la Lingvoj 2007 EU-Komisionano Leonard Orban substrekis la centran gravecon de motivado por sukcesa lingvolernado. Ĉi-kuntekste, ŝajnas ke la lernfaciliga aliro meritas seriozan konsideron.

Seán Ó Riain

Eŭropa Komisiono, Pliaj detaloj ĉe www.seanoriain.eu

⁷ *Frankfurter Allgemeine Zeitung*, 30 decembro 2006.

⁸ Francio aĉceptis la metran sistemon en 1791; Usono, Liberio kaj Birmo ankoraŭ ne aĉceptis ĝin.

⁹ Vidu studon ĉe http://www.internacilingvo.org/public/126_plena.htm;

¹⁰ <http://ilei.info/ipr/smide/liusz.htm>. Vidu ankaŭ Lobin, Günter, 2002: *Ein Sprachmodell für den Fremdsprachenunterricht. Der propädeutische Wert einer Plansprache in der Fremdsprachenpädagogik*. Aachen: Shaker, doktora tezo.

¹¹ www.springboard2languages.org.

¹² Konferenco pri edukado la 12 septembro 2006. Vidu www.cnag.ie por la plena irlandlingva teksto, kun anglalingva resumo.

LA 24-A INTERNACIA FESTIVALO EN DUESSELDORF

En la 24-a IF partoprenis pli ol 190 personoj. Apud la festa etoso okazis abunde klerigaj prelegoj kaj viglaj diskutoj.

Inter aliaj E. Macko prelegis pri la „Dialogikaj trajtoj de la nuntempa internacia komunikado, kiuj estas samkiel la tri profundaj trajtoj de Esperanto“. 1.Kultur-dialogika 2.Soci-psikologia 3.Politik-demokratia. La prelego havis la konkludon, ke Esperanto devus montrigi kaj agi eksteren, cxar siaj jam pli ol 120 jaraj spertoj estus por la nova kvalito de la necesa internacia dialogo favore aplikeblaj. Tiu turnigxo eksteren povus okazi plej gxenerale politik-demokratie, en la Europa Unio, por kiu estas la politika movado de EDE (Europo Demokratio Esperanto) bonvena.



Samtage, posttagmeze, vekigxinte la politikan interesojn de (c.a. 30) partoprenintoj okazis diskutrondo gvidata de A. Schubert kaj E. Macko, „Cxu (tuteuropa) Esperanto-partio eblas?“.

La diskutantoj konstatis la retendan politikan agadon de esperantistoj, kiu versxajne bazigxas en la malbonaj historiaj spertoj. Sed en la estanteco la vizagxo de la politiko tute sxangxigxis kio devus esti ekkonata. Neniam estis pli aktuala la politika movado por

esperantistoj, ol nun en la EU.

Tiun aktualecon jam ekkonis ankaux aliaj movadoj, kiuj nun volas apliki tiun novan, internacian kvaliton. Estis menciita la tuteurop-politika movado de „Newropeans“ (fondita de iamaj Erasmusstudentoj) kiuj havas preskau la saman celon kiel la EDE. Ili emfazas cxiam denove la „internacian demokration“, (kun la angla lingvo), sed ni cxiuuj scias, ke en ilia kvalito de internacieco mankas la plejgrava, la „lingvademokratio“. Pro tio, se ili havas sxancon, EDE havas sincere ecx multe pli.

La prospero dependas de la laborfortoj kiuj apogos la movadon gxis la Europaj Balotoj en la jaro 2009. EDE mem povus havi vastan apogantaron, se kelkaj Esperantistoj (kiel multe tiel bone) finigxus sian reziston kontraux la politika agado.

Partoprenis la diskutadon ankaux la UEA estrarano Klerici. Li emfazis la (kompreneblan) neutralecon de la UEA, sed li esprimis sian personan simpatian kun la politika movado.

La tempo estis gxusta, cxe la jarfino de 2007 decidi, cxu kaj kiel ni plulaboros por EDE. La jaro 2008 decidus cxu ni estos kapablaj partopreni la balotojn en 2009, aux ni devas lasi la tutan aferon. En Germanio 2004 ni ne havis suficxe da tempon por preparo, ni tamen atingis 2500 subskribojn. Se ni nun gxustetepe komencos labori, ni havos pli da sxancojn. Nature, kaj tio etas la plej grava; se la esperantistoj vaste apogos nin, cxie kie ili ekzistas. Pro tio estas samgrava en tiu jaro konvinki la esperantistaron pri la favoro de la politika ago.

Tiel ni devas cxijare plifortigi la informadon tuteurope, cxe esperantistoj kaj ili devas en la propraj landoj, cxe iliaj samlandanoj per siaj naciaj lingvoj, pluinformi. Vi mirigxos, se vi alparolos viajn samlandanojn, ekz. cxe iu infotablo en la stratoj, kiel multe de ili konsentas kun la profundaj trajtoj de esperanto kaj la programo de EDE.

Eugeno

ESPERANTO KAJ INTERRETO

Mi deziras raporti pri unu gravega atingo de Esperanto sur la kampo de interreto, pri kiu tamen gxis nun apenaux aperis informoj en la Esperanto-komunumo. Unue mi auxdis pri gxi de Toon Witkam.

Cxu vi rekonas la vortojn "kaj estas", eventuale "kaj la estas"? Jes, ilin oni uzis en sercxiloj kiel Google aux Yahoo kiel aldonon al la efektive sercxata esprimo, por elfiltri el la tuta reto nur la esperantlingvajn pagxojn kaj en tiuj sercxiloj. Tiu solvo funkciis relative kontentige.

Ekde kelkaj monatoj tamen, tiaj vortoj ne plu estas necesaj, cxar Google decidi aprezi la Esperanto-komunumon, aldonante Esperanton kiel unu el la lingvoj laux kiuj eblas filtrigi la rezultojn de sercxo.

Atentu, ke ne temas pri la ebleco vidi la retpagxaron de Google en Esperanto! - tio jam eblas ekde longa tempo kaj da tiaj lingvoj estas pli ol cent, inkluzive de interlingvao kaj porka latino.

La nova decido de Google envicigas Esperanton inter nur 43 lingvojn al kiuj eblas limigi la rezultojn de efektivigata sercxo. Tial la robotoj de Google nun traitante la reton auxtomate rekonas retpagxojn skribitajn en Esperanto kaj dum sercxado ebligas al la uzanto sercxilo nur ene de ili. Saman pozicion kiel nun Esperanto ankoraux ne havas en Google tiom grandaj lingvoj kiel la hinda, la bengala, la latina, la afrikansa, aux la svahila. Cetere, Esperanto estas la sola artefarita lingvo tiel agnoskita.

Por sercxilo per Google nur esperantlingvaj pagxoj, uzu la adreson:

http://www.google.com/webhp?hl=eo&lr=lang_eo

Gravas en la adreso la teksto "&lr=lang_eo" cxe la fino - tiu limigas la rezultojn al esperantlingvaj pagxoj. Se vi aldonas gxin finen de adreso de ajnaj sercxrezultoj en Google, tio montros nur tiujn rezultojn kiuj estas skribitaj en Esperanto.

Laux la provizataj informoj, sxajnas ke Google nun kapablas sercxilo ene de pli ol 2.680.000 esperantlingvaj pagxoj. Tio donas bonan bazon ankoraux por utiligo de Google kiel granda korpuso de Esperanto.

Marek Blahus

Oficiala organo de Eŭropa Esperanto-Unio.

Finredaktita: la 31-an de januaro 2008.

Redaktorino: Vesna Obradović.

En la numero kunlaboris: Zlatko Tišljar, Danka Tišljar, Seán Ó Riain, Eugeno, Marek Blahus kaj Vesna Obradović

Kontakto: vesna.obradovic@gmail.com

Retpaĝo: <http://www.lingvo.org>, www.europo.eu